*Aperis en: GrKG/H 44/3, sep. 2003, p. 169–170*

**Protokolo de la Ĝenerala Asembleo okazinta en Sibiu en la Lucian-Blaga-Universitato. Dimanĉo, 23.2.2003, 12:00–13:00h.**

**Formalaĵoj.** La tagordo estas akceptita. Voĉojn havas (laŭ stato de la 16a februaro 2002): Fössmeier 2, Frank 4, Holdgrün 2, Lobin 1, Minnaja 4, Pennacchietti 1, Quednau 2, Viereck 1. Tiu konstato estas akceptita kun unu sindeteno.

**Apelacio.** Kandidatino Faloba pro privataj kialoj ne sukcesis rilate al sia doktoriĝa tezo plenumi ene de du jaroj la kondiĉojn starigitajn de la ekzamenkomitato dum ŝia ekzameno. Ŝi petas pri prokrasto de la limdato. LaĜenerala Asembleo akceptas unuanime kun du sindetenoj. La nova limdato estos la SUS en San Marino en tiu ĉi jaro 2003.

**Financa raporto.** Kolego Lobin kiel revizoro prezentas la financan situacion de AIS. Interalie pro manko de skriba prezentado ne eblis facile sekvi la raporton kaj ties detalojn. Laŭ informo de la prezidanto la impostofico intencas ne plu agnoski la komunutilecon de AIS; sekve la donacoj en Germanio ne plu estas subtraheblaj ĉe la impostdeklaro de la donacinto. Post la raporto dela revizoro la Ĝenerala Asembleo aprobas la laboron de la financofico, sed postulas refaradon de la bilanco por 2001 kaj 2002, por ke estu klare, ke eblas konservi la komunutilecon. La Ĝenerala Asembleo rekomendas konsulti specialistojn pri tio, se ties honorario ne superas 200 eŭrojn. Por la jaro 2001 la trezoristo estas unuanime senŝarĝigita.

**Konstitucipropono.** Montriĝas, ke la konstituciŝanĝo postulas pli da preparlaboro. Tial estas starigita komitato, kiu okupiĝu pri ĝi laŭ la prezentita de la prezidanto teksto, kun definitiva vortigado. Se la membroj de la komitato samopinias pri unuopaj punktoj, tiam ĉi tiuj punktoj estu akceptitaj. Alikaze okazu voĉdonado de la Ĝenerala Asembleo pri ellaboritaj alternativoj. Al la komitato apartenu la kolegoj Alsleben, Bormann, Frank, Holdgrün, Minnaja, Quednau kaj Ŝilo.

Pri la *laborplano 2003* okazis neniu decido.

**Aliaj proponoj.** Kolego Quednau petas plilongigon de la valideco de la BUS-regularo. La Ĝenerala Asembleo akeptas tion. Krome estu forigita la konfuziga tajperaro en tiu regularo.

Pro manko de tempo aliaj punktoj ne plu estis trakteblaj resp. akcepteblaj.

Protokolis:
*H. S. Holdgrün,*
Protokol- kaj Publikigofico